LVP

PILO-PRESS

Internacia

Informservo

N-ro 9/1976 - 26 feb 1976
Aperas ĉiusemajne

Pilo-Press

Jarabono 30 GM

Pagu al
Ludwig Pickel
D-8500 Nürnberg
Pĉk. Nürnberg 819 56-851

Eldonanto/Herausgeber:
Ludwig Pickel
Postfach 2113
D-85 Nürnberg 1
Tel. (0911) 46 36 49; 51 42 69

## Pri vojaĝo al Aŭstralio kaj la Pacifika Esperanto-Kongreso

Vieno (pp) - Emil Vokal, Esperanto-parolisto ĉe Radio Vieno, raportis la 7/8 feb en la Esperanto-elsendoj de Radio Vieno, pri sia vojaĝo al Aŭstralio, la partopreno en la 20-a Aŭstralia Esperanto-Kongreso kaj la 1-a Pacifika Kongreso de Esperanto.

Pilo-Press ĉi-sekve publikigas la raporton:

"Antaŭ ĉio, karaj geaŭskultantoj, mi transdonas al vi la sincerajn salutojn de la gepartoprenantoj de la 20-a Aŭstralia Esperanto-Kongreso kaj de la 1-a Pacifika Kongreso de Esperanto okazintaj de la 2-a ĝis la 10-a de januaro en Melburno same de la Pacifika Postkongreso en Sydnejo.

La 25-an de decembro mi flugis de Schwechat kun Quantas-flugasocio al Singapuro, la maŝino havas lokon por 350 pasaĝeroj. En Singapuro atendis min la novzelanda samideano inĝ. Allan Dickie kaj la ĉina samideano Hongi Liao kun iliaj familioj. Dum mia dutaga restado ili gvidis min per aŭtomobiloj tra la urbo kaj al la vidindaĵoj, precipe plaĉis al mi la japana kaj ĉina ĝardenoj. Nia konversacio estis nur en Esperanto, mi loĝis kiel gasto en la hejmo de s-ano inĝ. Dickie. S-ano Hongi Liao diris al mi, ke mi estis la unua eksterlandano kun kiu li parolis en Esperanto, li lernis laŭ la libroj la Internacia Lingvon - la interkompreno estis tre bona. Kortuŝe mi adiaŭsi de novaj geamikoj.

La 29-an de decembro atendis min en la flughaveno de Melburno mia malnova amiko Herbert Koppel kun sia frato - mi ĉirkaŭbrakis ilin post 37 jaroj - ili estas eksvienanoj. Kruela sorto de naziismo forpelis ilin de la hejmlando. Herbert fondis kun mi antaŭ 40 jaroj en Vieno la Esperanto-societon "Harmonio"; en Aŭstralio li organizis kelkajn tutkontinentajn Esperanto-kongresojn. Li sukcesis fondi kooperativon kaj organizis la aĉeton de domo kiel hejmon de la Melburna Esperanto Klubo.

La kongresoj okazis en la Queen's Kolegio de la Melburna Universitato. Aliĝis 250 gesamideanoj el 8 nacioj. Unue okazis la ĝeneralkunveno de la Aŭstralia Esperanto Asocio. La lingva seminario pritraktis interesajn demandojn. Varitea vespero kaj aŭtobusa ekskurso al la vidindaĵoj kaj belegaj ĝardenoj ĝojigis ĉiujn. La 4-an de januaro okazis ekumena diservo kaj bonveniga vespero. La venontan tagon estis aranĝita gazetara konferenco, kelkaj ĵurnalistoj ankaŭ dum la venontaj tagoj intervjuis la gekongresanojn, la oficiala informservo aŭstralia raportis internacie kun fotoj.

La 1-an Pacifikan Kongreson de Esperanto solene malfermis la sinjoro ministro por turismo Hon. Murraj Byrne; en sia parolado li substrekis la gravan valoron de la Internacia Lingvo Esperanto por la turismo. Vespere estis prezentita la aŭstralia Esperanto-Sonfilmo "La kvina fasado - pri la nova operejo de Sydnejo". Ĉeestis la du parolintoj en tiu grandioza filmo, prof. Robertson kaj s-ano Volo Gültling. Sekvis prelego pri Nov-Zelando.

Dum ekskurso ni vidis la faman domon de Captain Cook. Dum la literatura sesio mi kontribuis per prezento de la poemo "Belasazar"

kaj kun la poemo de Raymond Schwartz "Kisu min ankoraŭfoje" mi amuzis la gastojn. Tuttaga ekskurso al Healesville ebligis al ni studi la faŭnon de Aŭstralio. Ni vidis la koala-ursojn kaj la kanguruojn kaj bestojn, kiujn mi vidis la unuan fojon en mia vivo.

Eminenta preleganto estis la japano Eizo Itto el Kameoka; tiu urbo estas ĝemelurbo de la aŭstria urbo Knittelfeld. Li parolis pri la temo "Unu mondo - unu religio" kaj pri la Oomoto-Movado.

S-ro Chris. Fettes prelegis pri Irlando, s-ro Marcell Leerweld parolis pri "Gramatiko - simboliko". Elstara preleginto estis s-ino Isobe de la Japana Esperanto Instituto. La kunsidoj de UEA kaj de SAT pritraktis organizajn problemojn en Aŭstralio. Mi aktive partoprenis 2 radio-intervjuojn kaj akcepton por la aŭstralia televizio.

Emocia kulmino de la kongreso estis la bankedo dum kiu estis elparolitaj tostoj je la ĉeestintaj nacioj. La toston je la Eŭropa Esperantistaro parolis s-ano D-ro A. Einihovici; mi havis la honoron respondi kaj transdonis al la sekretario de la Aŭstralia Esperanto-Asocio, Herbert Koppel, la honor-insignon de Aŭstria Esperantista Federacio por liaj meritoj en Aŭstrio kaj Aŭstralio, same ankaŭ la insignon de la Asocio por Internaciaj Kontaktoj - Esperanto-Amikoj. Al lia edzino, Fay Koppel, mi transdonis en la nomo de la Belga Esperanto-Asocio kaj de AEF tablotukon, menciinte ŝian multjaran aktivecon por la Aŭstralia Esperanto-Asocio. La sekretariino de la Brusela Esperanto-Klubo, Elfriede Ernst, ankaŭ gratulis al s-ino Fay Koppel. La dramo-ŝildon por bonega prezentado dum la teatra vespero ricevis Esperanto-grupo de Manlaj ĉe Sydnejo; ili ludis la skeĉon "La geedza feliĉo"."

*******************

Pri la Someraj Universitataj Kursoj

Antverpeno (pp/pf) - En Antverpeno ekfunkciis la Loka Organiza Komitato de la 3-a Sesio de la Someraj Universitataj Kursoj (SUK) (8-a ĝis la 29-a de aŭgusto 1976) sub la gvidado de D-ro Wim M.A. De Smet. La LOK havas apartan poŝtkeston: Someraj Universitataj Kursoj - Universitaire Zommercurcussen, P.B. 103, B-2000 Antverpeno. Aliĝilojn kaj mendojn oni bv. sendi al Lieĝo: SUK, B.P. 9, B-4000 Liege 3, Belgio. La 3-a Sesio de SUK, kiu konsistos el kursoj pri biologio, matematiko kaj sociologio, okazos sub aŭspicio de Universala Esperanto-Asocio, laŭ la januara decido de la UEA-Estraro.

La Estraro de SUK, precipe la tri sekretarioj, Reneé Triolle, Léon Hauregard kaj Uwe Moritz, el la kvinmembra Estraro, en ĉiu monato havas sian kunsidon, kvankam ili loĝas en tri diversaj landoj. Dum la kunsidoj la plej ofte leviĝas la financaj problemoj, ja la ŝuldoj de la asocio superis 100.000 belgajn frankojn je la jarfino. La kaŭzo de la malprofito estas ĉefe la grandaj kostoj de la 2-a Sesio en Lieĝo kaj la eldona agado. La situacio iĝos iom pli bona, se la kursotekstoj de la 2-a Sesio elĉerpiĝos. Tiuj ĉi kajeroj sendube estas gravaj kontribuaĵoj al la evoluigo de la scienca lingvo.

SUK nuntempe serĉas mecenatojn. Kelkaj organizaĵoj kaj individuoj jam donacis aŭ pruntis monon por la ASOCIO SUK, venis ankoraŭ promesoj. Povas esti valora helpo, se oni donacas monon por stipendioj, subtenante la partoprenon de tiaj studentoj kiuj havas financajn malfacilaĵojn. Cetere, la organizantoj de la 3-a SUK-sesio donas gravan rabaton al studentoj.

Kiu volas subteni SUK, turnu sin al: Someraj Universitataj Kursoj, B.P. 9, B-4000 Liege 3.

Semajno de Internacia Amikeco (SIA)

Salutas ĉiujn partoprenantojn en niaj karavanvojaĝoj!

Petu programon por Ateno!

Komunaj Esperanto-Kongresvojaĝoj

Løvetandsvej 31

DK-2700 Brønshøj , Danlando

---

Salutas ĉiujn partoprenintojn de la harmonia, optimisma, sukcesa Esperanto-Kongreso!

LKK por la 60-a

---

UEA-informilo

UEA eldonis 4-paĝan informilon kun sugestoj pri agado okaze de la Semajno de Internacia Amikeco. Bedaŭrinde la informilo eliris tro malfrue por esti utiligebla por la nun finiĝanta semajno. Sed ĝi valoras esti studata por trovi instigojn kaj konsilojn por la venontaj jaroj.

******************

Paderbornaj labor-raportoj

Paderborn (pp)- FEoLL - Instituto por Kibernetika Pedagogiko, Paderborn, eldonas nun siajn labor-raportojn kun mallongaj resumoj en Esperanto aŭ parte eĉ en Esperanto. Limigita kvanto de tiuj labor-raportoj estas disponebla por esperantistoj. Interesuloj turnu sin ekskluzive al Ludwig Pickel, Libroservo, Postfach 2113, D-8500 Nürnberg, kiu havas la solvendorajton por tiuj raportoj. Speciala listo estas havebla.

Speciale interesa por esperantistoj estas:

Instruplaniga raciigo de la lingvo-instruado, kiu entenas la rezultojn de la unua mezurado pri la Internacia Pedagogia-Didaktika Eksperimento Kvinlanda de prof. István Szerdahelyi kaj aliajn interesajn raportojn pri Esperanto-eksperimentoj kaj klerigteknologio en planlingvo-instruado. La labor-raportoj en tiu kajero estas ĉefe en Esperanto verkitaj.

Zur Plansprache Esperanto - Ein rechnererzeugtes Lehrprogramm

Pri planlingvo Esperanto - Instruprogramo farita de komputero Aŭtoro H. Behrmann. Tiu broŝuro estas verkita en germana lingvo.

Petu liston pri ĉiuj haveblaj broŝuroj de Ludwig Pickel, Libroservo, D-85 Nürnberg 1.


Grava eldonaĵo en germana lingvo

Darmstadt (pp) - En la serio "Wege der Forschung" (Vojo de esploro) la germana eldonejo Wissenschaftliche Buchgesellschaft, Darmstadt, ĵus eldonis la volumon "Plansprachen Beiträge zur Interlinguistik" redaktita de Reinhard Haupenthal.
Formato 13 x 20 cm, bind., 365 paĝoj, prezo 67 GM.

Detaloj sekvos en la venonta numero. Tiu libro estas aĉetebla ankaŭ ĉe Libroservo Ludwig Pickel, Postfach 2113, D-8500 Nürnberg 1

Germanlingva poŝlibro pri Esperanto

Nürnberg (pp) - Eldonejo Bleicher Verlags-KG, Postfach 70, D-7016 Gerlingen, anoncas la baldaŭan aperon de germanlingva poŝlibro pri Esperanto kun la titolo "Mein geliebtes Esperanto" (Mia amata Esperanto). Aŭtoro estas Richard Schulz D-7841 Auggen, Oberstudienrat a.D., kiu konatiĝis kun Esperanto jam kiel 10-jara knabo en 1922. Depost kelka tempo li denove estas aktiva kaj faras ankaŭ prelegojn pri Esperanto. Li ĉeestis la germanan Esperanto-kongreson en Oberkirch.




La prezo por la libro estas 14,80 GM. Ĝis 30.4.76 validas subskripcia prezo de 11,80 GM.

******************

Esperanto en la radio

Svisa Kurtonda Servo. D-ro A.Baur donis plian parton en sia serio pri la reto-romanĉa lingvo. Vere interesa serio! Ge-sroj Gacond pasintfoje finis sian prelegserion pri la Literatura Mondo kaj komencis novan serion pri la facileco de Esperanto pruvante tion per ekzemploj en la instruado de la franca kaj Esperanto.

Vieno. La ĉi-semajna komentario de Werner Schmidt mencias denove la malnovan problemon minoritatan en Karintio: "Nova traktato pri kompenso de aŭstraj posedaĵoj en Ĉeĥoslovakio, kaj du novaj limtransirejoj enkondukas esipereble epokon de normala bonnaĵbara sinteno.

Malbona, kontraŭe, restas la rilato inter niaj ne-slovenaj kaj slovenaj Karintianoj. Ili certe baldaŭ pasie remalpacos. Temas pri la plenumo de la ŝtatkontrakto. La ne-slovenoj volas ĝin dependigi de minoritatkonstata kapnombrado, kiun la slovenoj rifuzas, montrante, ke per unuiĝoj de diversaj komunumoj oni manipulis la popoldistribuiĝon tiel, ke multloke la slovena minoritato ŝajnus nur malpli granda ol ĝi vere estas, ne atingante la 25%-an proporcion necesan por certigi al ĝi la minoritatajn rajtojn.

Por ne fronti tiun evidente nesolveblan problemon, oni preferas komfortan diskutadon pri la demando, ĉu oni invitu al Aŭstrio la Someran Olimpikon de la ankoraŭ tiom malproksima jaro 1988.

Ho, se ni havus multajn tiajn problemojn!"

Varsovio. Dum la pasinta semajno en la Esperanto-redakcio de Varsovio eniris entute 156 leteroj, certe tio estas impona nombro. Kaj laŭ la eldiroj de Jan Klimek la enhavo de multaj korespondaĵoj estas altnivelaj. Tamen laŭ mi ankaŭ Varsovio havas korespondajn problemojn: Se la plej multaj korespondaĵoj venas de ĉ. 10 personoj, tio estas, se unuopaj personoj skribas semajne 20, 15, 10 aŭ 5 leterojn kaj kartojn, tio certe momente garantias altan nombron da korespondaĵoj. Tamen laŭ mi estus pli bone se 100 personoj skribus 150 aŭ 200 korespondaĵojn. Certe la "kolonoj" daŭrigu sian vere noblan kaj ofereman skribadon, sed Pilo-Press alvokas ĉiujn aŭskultantojn skribi ĉiusemajne 1 korespondaĵon, ne nur al Varsovio, sed ankaŭ al la aliaj stacioj. Ĉar nur la konstanta alfluo de korespondaĵoj de plej eble multaj personoj je la daŭro garantias la ekziston de niaj Esperanto-elsendoj. Kutime oni devas pagi por radio- aŭ televid-elsendoj. Rilate al Esperanto-elsendoj tiaj pagoj estu la korespondaĵoj!
Cetere, la Varsovia leterkesto fakte estas laŭ mi la plej interesa programero nun, kiu eble eĉ superas la Esperanto-Ekspreson!